

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Okazos

Hama-Ronda Tago - Malfermo de la Muzeo

En la 20a de novembro (dimanĉe) posttagmeze, ni malfermos, precipe al niaj membroj, Esperanto-Muzeon Jokohaman. Kvankam ĝi estas ĉiam por niaj membroj, ankoraŭ estas ne- aŭ maloftevizitintaj personoj. Estas bona okazo kun la gvido, scii kie estas kio en la muzeo. Bonvenas vizitoj de aliaj lokoj ekster Jokohamo.

La 52-a Zamenhof-Festo, vid-al-vide post 2 jaroj

En la 18a de decembro (dimanĉe) de 12:30 ĝis 16:30 okazos la Zamenhof-Festo de Esperanto-Ligo de Kanagawa (ELK), en Tergloba Placo (Earth Plaza) de Kanagawa, lokita proksime de la stacidomo Hongodai en Jokohamo. ELK inkluzivas nian rondon en Jokohamo kaj rondojn en Kawasaki, Huzisawa kaj Odawara. Por 2020 kaj 2021, Zamenhof-Festo okazis nur rete, do tiu ĉi fariĝos kara okazo renkonti nin reciproke. La programo kaj kotizo estas nun planata.

Okazis

Prezento de spertoj

En la 3a de septembro okazis en nia Muzeo, "Prezento de spertoj", fare de 9 anoĵ. Ĉeestis ĝin 14 anoĵ. Interalie, Suzuki Keiichiro prezentis pri la pasinta Universala Kongreso en Montrealo (foto maldekstre), kaj Namba Fumiharu pri la trajnvojaĝo trans Kanado ĝis la kongresejo (foto dekstre). Miyazaki Hideko prezentis japanan tambureton "kotsuzumi", kaj ludante kaj kantante laŭ ties sono – pri tio legu la eseon en p.3.



★ La retadreso de nia redakcejo ŝanĝiĝis. Vidu sube.



■ Eldonas NPO Esperanto Jokohama ■ Redaktas : Sibayama Zyun'iti, Noriko

■ Adreso: Nagatahigasi 1-19-1, Minami-ku, Yokohama-si,
Kanagawa-ken, Japanio (JP-232-0072)

■ Redakcejo: tamtamo@eo-jokohama.bona.jp ■ TTT-ejo: <http://www.esperanto.yokohama/>

■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-i (Jokohama Esperanto-Rondo)

La 125-a Legokunsido

En la 2a de septembro 2022 ni havis la 125-an legokunsidon por “Krimeo estas nia” de Kalle Kniivilä. Partoprenis 3 personoj.

Ĉu inter lupoj oni devas krii lupe? Impreso pri “Krimeo estas nia” de Kalle Kniivilä

Mizro Iwaya

Kiam mi aŭdis la militiron de la rusia armeo en Ukrainion, mi estis tute surprizita. Kial ili faras tian sensencan agon? Certe ili havas konflikton inter si. Certe multaj ricevis damaĝon pro la konflikto. Sed tia militado simple pli grandigas la damaĝon inter si. Kial?

Mi scias ke ĵurnalisto Kalle Kniivilä verkis tiuteman libron jam antaŭ jaroj. Do ni elektis tiun libron por nia legokunveno. Ĝi donos ian ŝlosilon al nia demando.

Kiam mi legis tiun libron, du punktoj aparte tiris mian atenton.

1. Simileco de la aferoj en 2014 kaj en 2022.

2. Malsimileco de la opinioj inter la du: Ukrainio kaj Rusio, aŭ krimeaj ukrainoj kaj krimeaj rusoj

Mi ne skribos ĉi tie kiel procedis la afero en 2014 kaj en 2022. Ambaŭ estas tre similaj, sed la skalo estas multe pli granda ĉifoje. Ni iru al la dua punkto: malsimileco.

Ni japanoj kredeble ne aŭdas multon pri la opinio de la rusa flanko. Japanaj ĵurnaloj informas ĉefe el la flanko de Ukrainio aŭ Usono, ke la invado de rusia armeo estas maljusta. Al mi estis okulfrapaj la opinioj de por-rusiaj loĝantoj. Eĉ ĝisosta subtenanto de Putin aperis en la libro. Ŝi diris, “ĉio estas bona kun Putin.” Rusa ekonomio reakiris viklecon post lia prezidenteco en 2000-aj jaroj post bedaŭrindaj 1990aj jaroj de stagnado far Jelcin.

Kompreneble aperis ankaŭ kontraŭ-rusiaj loĝantoj. Precipe tatar-devenaj loĝantoj suferis multon dum la sovetia tempo kaj tenis sian rankoron post ĝia disfalo. En 1850a krimea milito Turkio akiris venkon kontraŭ Rusio kaj komenciĝis transmigrado de tataroj al Krimeo. Sekvanta granda okazaĵo estas la dua mondomilito, kie Sovet-Unio batalis kontraŭ Nazia Germanio kaj akiris venkon. Tiam Stalino akuzis tatarajn loĝantojn je asisto al germana armeo. Tio kondukis lin al forpelo de tataroj el

la duoninsulo.

La opinio de la aŭtoro plej proksimas al tiu de Irina Proĥorova, kiu aperis en la lasta ĉapitro de la libro. Ŝi loĝas en Rusio kaj staris longe kontraŭ la agresemaj politikoj de Putin kaj liaj subtenantoj. Sed ŝi ne povis akiri majoritaton kaj rezignis el politika agado. Ŝi nun aktivas en redaktado de lokaj eldonaĵoj. Ŝi opinias ke nunaj rusoj estas obsedataj de malnova sovetia imperiismo kiun dissendas rusaj amaskomunikiloj.

Mi memoras ke la prezidanto de nuna Rusia Esperanto-Unio forte kritikis la sintenon de UEA, kiu subtenas ukrainan flankon. Li opinias ke UEA tute ne estas neŭtrala en tiu rilato, kaj se tio daŭros, li devos konsideri la ekziĝon elde UEA. Ni vidas ke Esperantistoj havas vastan reton de informoj tra la mondo, kaj tamen li determinis sian sintenon malgraŭ ilia ekzisto. Ĉu diskutoj ne solvos la problemon?

Krimeo, aŭ estunta Ukrainio

– leginte “Krimeo estas nia” de Kalle Kniivilä –

Sibayama Zyun’iti 2022-09-17

Al ni multaj japanoj konantaj Sovetion, “ukraina popolo” signifis nur unu el la popoloj, kredeble amikaj, al rusoj. Vasilij Eroŝenko estis ukrain-devena, naskiĝinta en Gubernio Kursk, tuj oriente de la nuna Ukrainio, sed mi ne povis spuri ion precipe ukrainian en liaj biografio kaj verkoj. Poeto Miĥalski, naskiĝinta en la tero de nuna Ukrainio, estas tia.

Kredeble la similo validas por rusdevenaj homoj, kiuj loĝas en la Duoninsulo Krimeo, ekaparteninta al Ukrainio post la falo de la Sovet-Unio. Legante tamen tiun libron por nia Legokunsido, mia impresio estas, ke en Krimeo loĝas pli da “rusoj” ol naciece “ukrainoj”. La duoninsulo estas grandece meze inter japana insulo Sikoku kaj Kyusyu, kaj loĝas tie iom pli ol la duonoj da homoj en Sikoku. Sed la situacio estas malpli simpla. Tie loĝas interalie tataroj, devenantaj de azia distrikto. Iama pli multo,

sed malplimulto jam en la soveta tempo.

Nu, tiu ĉi libro komenciĝas de la sceno, ke meze de februaro 2014, en Krimeo, tiam parto de la Respubliko Ukrainio, descendas sekurectrupoj ne-identigitaj, sed klare rusiaj, kaj nur post 2 monatoj, per la “referendumo”, t.e. voĉdonado fare de la loĝantoj, la distrikto aliĝu al Rusio – kion la Kieva aŭtoritato ne agnoskis, sed tiel estis.

La aŭtoro, finna ĵurnalisto en Svedio, vizitis la Krimean Duoninsulon, kaj ankaŭ la centron de Ukrainio kaj Rusio, aŭtune de tiu 2014, kaj intervjuis al multaj homoj, i.a. al esperantistoj, kaj verkis tiun ĉi libron. La intervjuitoj varias, laŭdevene rusa, tatara kaj ukraina, kaj laŭ starpunkte, por-rusia, por-ukrainia. luj ĝojas, ke ili nun apartenas al Rusio, aliaj nur kaŝe esprimas opinion alinuancan. Al tataroj, io estas bona, alio estas malbona, ktp.

Tiu ĉi libro eldoniĝis en 2015, kaj la situacio ŝajne stabiligis per la anekso de Krimeo al Rusio. Sed nun, ni jam scias, ke Rusio “invadis” (ili diras: “operacas en”) la ukrainian ĉefteron. Ni do komprenas, ke Rusio intencas fari la samon al la ĉeflando, kion mi nomas per esperanta

popola dirmaniero “estunta Ukrainio”, nome tia Ukrainio, kia “estus” same kiel 2014-a Krimeo: februare invadinta, kaj estus referendumo tut-ukrainia por peti anekson al Rusio, jam en marto. Sed ne tiel okazis.

Ja Krimeo estas iasence fremda loko, ĉu por ni Okinavo? Turismejo de la ĉeflandanoj, sed periferia distrikto.

La libro estas kun seriozega etoso, sed jenloke mi ridis: el Krimeo fuĝis usonaj entreprenoj, kaj “Starbucks” fariĝis “Starducks” (t.e. Stelo-anasidoj), kun marko de anasido interne anstataŭ reĝino, kaj “McDonald’s” fariĝis “WcDonald’s”.

* * * * *

(Aldona noto je la 1-a de oktobro)

Hieraŭ, la 30a de septembro, la esprimo “estunta” fariĝis “estinta”: Putin deklaris, surbaze de “referendumo”, 4 regionoj en la orient-suda Ukrainio apartenas jam al Rusio. Neniu okcidentano kredas ke la referendumo estis juste farita, sed kredeble la rusa popolo kredas...

Enkonduko de Kotsuzumi

Miyazaki Hideko

Saluton. Hodiaŭ mi volas paroli pri Kotsuzumi, japana tambureto.

Kotsuzumi estas japana tradicia tamburo, sed ĝi originale naskiĝis en Barato, kaj ĝi pasis tra Ĉinio, finfine ĉirkaŭ la sepa jarcento venis al Japanio. Poste Kotsuzumi estis uzata kiel muzikilo de Nogaku kaj Kabuko, japanaj tradiciaj teatraĵoj.

Ĉi-jare multaj enkondukaj klasoj de Kotsuzumi okazis en Tokio kaj Jokohamo. Mi partoprenis ĝin. Dank’ al la subteno de la registaro enkondukaj klasoj estis malmultekostaj.

Finfine mi aĉetis mian propran Kotsuzumi-n per reta butikoj.

Do mi volas ludi ĝin. Mi kantas Esperantan kanton, “Vizaĝon supren kaj paŝu ĝoje” kun Kotsuzumi.

La dekstra bildo estas memfarita kuprogravuraĵo de Miyazaki Hideko.



eseo

laŭ aĝo, laŭ sekso?

SIBAYAMA Noriko

Ĉu knabo portas rozkoloran dorsosakon? Lastatempe multiĝas knaboj, kiuj elektas dorsosakon kun virina(?) koloro. En kelkaj lernejoj knabino povas elekti pantalonon kiel uniformon.



Sed male ĉu knabo povas elekti jupon? Nun tio estas ankoraŭ kurioza kaj ankoraŭ ne agnoskita en la mondo. Ankaŭ mi sentas, ke virino kun pantalonon estas normala sed viro kun jupo estas ege stranga. Ĉu iam poste ambaŭ fariĝos normalaj?

Rememoru diversajn situaciojn kiam ni estis infanoj. Mi neniam imagis elekteblecon pri sekso krom viro kaj virino. Mi komprenis geedziĝon de viro kaj viro, aŭ virino kaj virino, sed mi ne imagis ke ĝi estos agnoskita. Nun la mondo draste ŝanĝiĝas.

En la jaro 1984, ni geedzoj vojaĝis Bulgarion, kaj tiam mi sentis ke miaj sandaloj tiam portitaj estas tro striktaj. Mi serĉis pli komfortajn sandalojn en magazeno. Tie oni vendis sandalojn nur laŭ grandeco, sed ne por infanoj ne por plenaĝuloj. Al mi tio estis ege freŝa kaj surpriza. Mi aĉetis unu paron da sandaloj. Ili estis por ambaŭseksoj kaj ege komfortaj al mi.

Kiam mi estis elementalerneĵano, mi vizitis ludilo-vendejon kun mia patrino. Ŝi diris, “Elektu unu ludilon, mi aĉetos ĝin por vi.” Mi ĉirkaŭrigardis kaj trovis molan plastan anason tre ĉarman kaj elektis ĝin. Do mia patrino diris, “Tiu ĉi estas ludilo por bebo. Vidu ĝi fajfas kiam mi puŝas la korpon.” La vorto “por bebo” damnis min. Mi ne plu havis forton kontraŭ ŝi. Mi sentis, ke ŝi mokas min. Verdire mi ne intencis ludi fajfigante la anason. Mi nur bezonis unu membron de mia ludtrupo. Mi kaj mia frato tiam havis nian trupon konsistantan el diversaj pupoj, kaj ludis imitante batalon. La ĉefo de mia trupo estis hundo kiun mi mem faris per argilo en lernejo. Mi ne memoras tiam kion mi elpetis de mia patrino, aŭ mi nenion petis.

Tun tagon mi elektis kiel mian ludilon tigran pupon telekondukeblan. Mia patrino rekomendis kudromaŝinon por infanoj, dirante, “vi povas kudri efektive per ĝi, do ĝi estas pli interesa ol la tigo.” Sed tiam mi insistis mian elekton kaj mi enmanigis la tigran. Revenvoje mia frato diris, “Mi preferas kudromaŝinon.”

Mi ne ŝatas apartigi ĉion laŭ sekso, laŭ aĝo.

raporto

La 109a Japana Esperanto-Kongreso

De la 23a ĝis la 25a de septembro, en Hachioji [haĉiooĝi], urbo 1 horon trajne de Jokohamo, okazis la 109a Japana Esperanto-Kongreso, sed kun hibrida etoso, nome ĉe la urbo mem kaj ĉe hejmo. Kelkaj el niaj membroj vizitis la kongresejon, aŭ per la reto (nome per Zoom aŭ per Discord). Ĝin partoprenis entute 397 anoj, el ili 177 efektive vizitis la kongresejon.

Jen estas la ĉefaj kontribuoj de ni Jokohama-anoj al la kongreso.

• Namba Fumiharu prezidis la fakkunsidon pri

Esperanto-informado de JEI.

- Sibayama Zyun'iti prezidis la 2 sesiojn de Studraporta Kunsido de JEI.
- Doi Hirokaz kaj Namba Fumiharu laboris kiel kongresa fotisto.

Nu, la planita ekskursiva vizito al la muzeo ne efektiviĝis, ĉar entute la ekskurso 2-taga ne okazis. Anstataŭe, vizitis nin en la 25a de sept., de Nagoya s-ino Yamamoto Yukiko, kaj en la 26a, de Nagasaki, s-ro Moriwaki Yasumasa.